# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 20/01/2022 Kvincentsesdeksesa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

---

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu** *Google Translate* **kiel vortaron**

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 786,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **292,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **206,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **181,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **107,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## la [esperanta retradio ](#)donas bonan ĉirkaŭ-5- minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



**3ZZZ** Se vi volas scii pli pri la vivo de Marcel aŭskultu la elsendon de la 17a de januaro 2022- li ĉiam aldonas novajn informojn al la antaŭaj rakontoj pri sia vivo- Alia temo de tiu elsendo estas la rolo de muziko en niaj vivoj *Franciska Toubale*



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



## EKSTRAĴOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). Numero 69 de "Por Komencantoj".

**GRAMATIKAJ GVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:**

1). En eŭropaj lingvoj oni el ekzistantaj vortoj kreas per afiksoj kaj per vocal- aŭ konsonant-ŝanĝoj aŭ per nenio novajn vortojn kun rilataj signifoj, ekz. *"great > greatness", "side > inside", "come > came", "when > where", "put > put".* En Esperanto oni faras tion per afiksoj (bona>malbona; bona>bonega), per speciala, nom. "aglutina", kunmetado, per verba finaĵo ("-as" k.t.p.), per ŝanĝo de vortspeco ("labori>laboro"), kaj per ordinara kunmetado kun streketo ("prezidanto-sekretario").

Demandoj: **A).** El la supraj kvin metodoj por kunigi vortojn aŭ vortpartojn, kiu(j)n el tiuj ni devas nomi "vortformado" kaj kiu(j)n ni devas nomi "vortkombinado"?

**B).** Ĉe la aglutina vortfarado, kiuj estas la reguloj obeendaj?

**C).** Kiu estas la ĉefparto de la vorto "prezidanto-sekretario"?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 566. . *Marcel Leereveld.*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 15a de januaro estis la tria sabato. Venis Roger, Chris, John kaj Ian

Ni nur atendis mallongan tempon por la kafaj mendoj ĉar mankis multaj homoj el Manlio pro la ĝeno de la Omikrona viruso, la nombroj de pozitivaj rezultoj de la testoj daŭre kreskas.

Kompreneble ni estas tre zorgemaj . Ni sidas ekstere apud la marbordo kaj ĉiam portas vizaĝmaskojn escepte kiam ni trinkas kafojn. *Chris Holliss*



# LA EDUKADA VALORO DE LA ZAMENHOFA DONACO AL LA MONDO

**PARTO 2**

2. Kreante la neŭtralan lingvon, Zamenhof celis provizi la homaron per facila, demokrata komunikilo, kiu pro sia neŭtraleco nutros internacian interkomprenon kaj kreos inter la homoj de la tuta mondo fratecon kaj egalecon. Ĉiu Esperanto-studanto ekkaptiĝas per ĉi tiu sento de internacia unueco kaj amikeco, ĉi tiu aparteno al la monda, homara komunumo. Esperantisto estas en forta pozicio fariĝi konsekvenca advokato de internacia kunlaborado, kaj ĉiu studanto de Esperanto jam faris praktikan paŝon antaŭenigante la idealojn de la Unuiĝintaj Nacioj.

3. Ni ofte malamegas gramatikon, kiu estas en la naciaj lingvoj tiom malsimpla kaj unuavide malracia. Tamen, ni ne povas seniĝi de ĝi. Fari tion estus kiel peni konstrui sen kompreni la principojn de konstruado. Gramatiko estas la nemalhavebla strukturo de iu ajn lingvo. Nia malŝato leviĝas, do, kiam ni ne povas kompreni la multajn nenecesajn aŭ nelogikajn gramatikajn leĝojn, kaj la ĝenan kvanton da neregulecoj en la naciaj lingvoj. En ili la gramatiko estas tiom komplika, ke ni ne povas vidi ĝin kiel harmonia strukturo. Lerni gramatikon sen la ŝarĝo de neregulecoj, esceptoj kaj frivolaj reguloj, ege valoras en la kompreno de kaj sia propra kaj de aliaj lingvoj.

4. Kiel metiisto devas fidi al siaj iloj, tiel studanto lernanta laŭregulan kaj konforman gramatikon povas fidi al ĝi. Ĝiaj iloj estas bonaj, kaj la studanto gajnas memfidon utiligante ilin. Esperanto estas ilo en kiu li ja povas fidi. Ne troviĝas neatenditaj enfalujoj, kaj funkciigi ĝin estas ĝojo. Ĝi estas utila kondukilo al la gramatiko de aliaj lingvoj. Li estas pli riĉa pro ĝi.

5. Esperanto posedas aldonan avantaĝon por ne-akademiemaj lernantoj, en kiuj kelkfoje evoluas iu komplekso de malplivaloreco pro tio, ke ili ne povas sukcese lukti kun lingvoj. Ĉi minuskompleksa sento estus ege malgrandigita se ili lernus Esperanton kaj tiam povus montri al la lingvoemaj lernantoj, ke ili povas uzi sian Esperanton tiom flue kiom la aliaj siajn francan, germanan aŭ latinan.

6. Instruistoj de fremdaj lingvoj konstante alfrontas de siaj studantoj senbazan kritikon koncerne la lingvon kiun ili lernas. La patrinan lingvon, en nia instanco la anglan, ili verŝajne akceptas kiel perfekta, normala kaj regula lingvo, kaj ĉio esprimita malsimile aŭ kun malsamaj gramatikaj reguloj estas 'stulta' aŭ almenaŭ neregula, nelogika, nenormala. Kaj verdire, natura, ŝanĝanta lingvo ŝajnas al ni logika kaj normala nur se ni studas ĝian evoluon tra la epokoj. Niaj studantoj forgesas, ke ilia propra lingvo, la angla, estas samgrade neregula kaj nelogika. Studante Esperanton, ili iĝas konsciaj pri tio, kaj pro tio ne nur akiras pli profundan komprenon de sia propra lingvo sed ankaŭ kreskigas pli justan kaj objektivan aliron al la strangeco kaj malfacileco de aliaj lingvoj.




Daŭrigota. (Verkis *Marcel Leereveld*, tradukis *Vera Payne*)

Mi kredas ke kiam argumento ŝanĝas al fizika batalo, la celo ŝanĝas al kiu estas fizike plej forta kaj ne plu al inteligenta solvo de la problemo. *Roger Springer*

# La duona vero.

(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*)



## ĈU NEKLERA AŬ ĈU MALICA ?

Nun la ĉefministro kreis novan moton: "Ni devas sekvi la naturan irdirekton", kiu estas nur la duono de la situacio kaj klara vero. Li estus devinta antaŭe aldoni al sia duonmoto la vortojn "POST KIAM ANTAŬ KELKAJ MONATOJ NI SUKCESIS DEVIGI LA VIKTORIAN REGISTARON ĈESIGI SIAN SUKCESPLENAN ELRADIKIGON DE LA VIRUSOJ EN VIKTORIO, ni nun konsekvence devas sekvi la naturan direkton". La "ni" en tiu antaŭaĵo estas ĉiuj kiuj tiam rifuzis aŭ instigis rifuzi la viktorianojn ne obei la viktoriajn registarajn postulojn pri "*lockdowns*", movlimigoj. Tiuj rifuzuloj, tiuj malhelpuloj, inkluzivas la ĉefministron mem. Se li kaj la aliaj estus helpintaj, ni en Viktorio ne havus virussuferantojn nek mortintojn, kiel oni sukcesis en Vestralio. Se vi plendas pri la virusoj nun kaj en la estonteco, kulpigu tiujn maldemokratulojn, kiuj faris tion AŬ ĉar ili ne uzis sian inteligenton AŬ ĉar ili INTENCE DEZIRIS KE MORTU "NEUTILAJ" MEMBROJ DE LA KOMUNUMO, LA MALFORTAJ, MALSANAJ, KAJ MALJUNAJ.

## LA KRUELA DIO.

Ĉar mi ne kredas en ĉiopovan dion, mi ne bezonas kulpigi Lin (aŭ ŝin) pro la de li ĉiopove permesata granda suferado de infanoj. Cetere estas interesa, ke homoj ekkredas pri dio ĉiam ĉar aliaj homoj mencias Lin aŭ Ŝin al li. Tial plej multaj interaĝuloj (12- ĝis 20-) ekkredas ĉar ili deziras esti malsamaj al antaŭa nereligieco.

Kiam ĉiu ĉirkaŭ vi "scias", ke dio ekzistas, devas esti por vi ege malfacila ne kredi en Lin.

## LA VETERO EN MELBURNO.

La vetero en Melburno estas nun plej ofte somere varma, escepte ofte en la semajnfinoj. La Naturo, aŭ iu alia, kulpas pri tio. Preskaŭ ĉiuj plantoj ne deziras flori en la varma mezo de la jaro. Esceptoj estas nur du aŭ tri eŭropaj arbustoj. Mia lageto, kun la akvolilioj, estas tute seka. Dum la jaroj pluraj akvolilioj mortis, ĉar ĉirkaŭ la lageto kreskas altaj arboj.

*Marcel Leereveld.*

## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:

(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



1). **A).** Ni devas nomi "vortformado" la vortkreadojn per afiksoj, per aglutina kunmetado,
per verba finaĵo, kaj per ŝanĝo de vortspeco, kaj ni devas nomi "vortkombinado" la ordinaran kunmetadon per streketo.

**B),** Unua: La ĉefelemento venas post la flankelemento; dua: La flankelemento perdas sian finaĵon; tria: la ĉefelemento ricevas la finaĵon de la nova vorto; kvara: por faciligi la prononcon oni rajtas meti la sensignifan literon "o" antaŭ la ĉefelementon (NE alian literon!).

**C).** "Prezidanto-sekretario" ne havas ĉefparton: ili estas egalaj (kaj pli bonas ne nomi la du vortojn "vorto", sed "vortkombinaĵo").

*Marcel Leereveld.*